# LIGILO


DE

BRAZILA ESPERANTO-LIGO

N-ro 21 - JAN/FEB/MAR 1994

## KARA LEGANTO

La ĉefartikolo de ĉi tiu Ligilo estas preskaŭ sen vortoj. Fakte ĝi estas foto. Tamen tre signiforiĉa foto. Ĝi registras la momenton, kiam S-ro Francisco Mattos de Oliveira, prezidanto de BEL, subskribas dokumenton, kiu rajtigas Brazilan Esperanto-Ligon alpropriĝi terenon en Brazilja por konstrui novan sidejon! Por BEL-estraro ĝi ankaŭ registras la kulminan momenton de longdaŭra kaj esperplena "batalo" . Sed ni konscias ke, se la "batalo" jam finiĝis, la lukto daŭras. Gravas nun arigi niajn fortojn por konkretigi malnovan revon, t.e, konstrui taŭgan, grandan kaj imponan sidejon, kiun brazila movado ja meritas



**De maldekstre: D-ino Conceição Caldeira, registara oficisto; S-ro Francisco Mattos de Oliveira, BEL-prezidanto kaj D-ro Aymoré Vaz Pinto, BEL-kasisto (fotis: José Carlos Dorini Ramos)**

# LIGILO

Oficiala trimonata interna bulteno de
BRAZILA ESPERANTO-LIGO
Caixa Postal 03625 70084-970 Brasília (DF) Telefone [061] 226-1298

## ESTRARO DE BEL

| | |
|---|---|
| Prezidanto | Francisco Mattos de Oliveira |
| 1-a Sekretário | José Carlos Dorini Ramos |
| 2-a Sekretário | Wilson Álvares de Oliveira |
| 3-a Sekretario | Lício de Almeida Castro |
| 1-a Kasisto | Aymoré Vaz Pinto |
| 2-a Kasisto | Maria das Dores Góes |

Kontrolkomisiono

Altino Araújo Vasconcellos
José Romão Filho
Paulo Ricardo Grazziotin Gomes

Anstataŭantoj

Adolpho de Miranda Silva
Ismael de Miranda e Silva
Maria Isabel Botelho Ramos

## PREZIDANTO DE LA FEDERACIA KONSILANTARO

Ivaldo Alves de Souza

## KOMITATANO "A"

Symilde Schenk Ledon

## LIBROSERVO

Adolpho de Miranda Silva
Francisco Mattos de Oliveira

## PERKORESPONDA KURSO

Carlos Maria
Francisco Mattos de Oliveira

## INFORMADIKO

José Carlos Dorini Ramos
Wilson Álvares de Oliveira

## ARKIVO

Cleto Galvão da Silva

# FONDAĴO ALMADA



La ideo plibonigi la sidejon de BEL ekspertas novan impulson post la anonco pri la tereno, kiun ni gajnis por starigi belan konstruaĵon. Rezulte de tio, pliaj donacoj por Fondaĵo Almada alvenis, kaj de individuaj homoj kaj de grupoj (el Anápolis-GO kaj Barra Mansa-RJ). Kelkaj donacintoj jam kontribuis antaŭe kaj pere de plia monsendo ili konfirmas siajn fidojn en la konstruo de taŭga sidejo. Krome, ili stimulas la aperon de novaj donacantoj, eĉ se la donacoj estas malgrandaj, ĉar granda nombro da ĉiumonataj etaj kvantoj baldaŭ fariĝos granda sumo. Sableroj formas grandajn plaĝojn! Jen do la pliaj donacoj ricevitaj, de la 21-a de decembro/93 ĝis la 31-a de marto/94: Alcyr Guedes de Almeida (CR$ 8.299,64), Anápolis Esperanto-Klubo (30.390,00), Antonio Felix da Silva (520,00), Antonio Gomes da Rocha (12.400,00), Armando Salvador Tuoto (920,00), Carlos Alberto Andrade (3.500,00), Carlos Fernando da Costa Alves (1.000,00), Cícero Ribeiro de Araújo (5.000,00), Cleusa Maria Leone Cezar (2.200,00), Dalva Inês Michelon Bento (2.000,00), Denisar Arneiro (5.000,00), Denise Arneiro Deslandes (2.250,00), Denise Saraira (3.500,00), Ecy da Silva Ferreira (2.250,00), Edina de Barros Reis (2.000,00), Enivaldo Alves Silva (50.000,00), Eurico Figueira (5.260,00), Felismar Manoel (4.140,50), Gilbert Rene Ledon (45.964,40), Helmuth Schenk (20.000,00), Jason Gonçalves de Lima (15.000,00), João Otávio Veiga Rodrigues (2.000,00), Jorge Bastos Furman (1.000,00), Jorge Neves Cezar (1.500,00), Jose Bastos Campos (8.200,00), José Joaquim Lunazzi (7.600,00), José Rabello de Paula (3.642,00), Maria da Guia Amorim (2.000,00), Marly de Oliveira Moysés (2.250,00), Néia Lúcia Souza (5.000,00), Neusa Priscotin Mendes (10.642,00), Paulo Vicente da Mota (4.000,00), Ramatis Santos Pessoa de Luna (2.000,00), Sociedade de Esperanto do Mato Grosso do Sul (60.000,00), Symilde Schenk Ledon (45.964,40), Tobias Ferreira (2.250,00), Wilson Pereira Deslandes (2.250,00). Entute estas Cr$ 381.892,94. Saldo de banka konto de FA - CR$ 5.252.350,80

Pluraj homoj donacas monsumon al BEL kaj por Fondaĵo Almada kaj por la ĝenerala kaso. Kelkfoje la pagintoj sendas al BEL monsumon iomete pli granda ol siaj ŝuldoj. Kvankam la diferenco ordinare estas malgranda, ni konsideras ĝin kiel donacon. Al ĉiuj ni tre dankas! La donacoj por Fondaĵo Almada aperas supre, la ceteraj koncernantaj al la unua trimestro/94 estas la jenaj: Alberto Flores (1.000,00), Alexandre Miguel Carneiro (4.300,00), Álvaro Rabelo (773,00), Antonio Félix da Silva (107,00), Carlos Caixeta Borges (10.000,00), Carlos Fernando Pettinati Ramos (2.116,86), Carlos Vieira Cruz (500,00), Carmo Alves Pimenta (100,00), Catarina Pinto de Souza (600,00), Cícero Gabriel Cardoso Soares (952,00), Cleber de Moraes Lemos (10.247,56), Daniel de Oliveira Santos (415,45), Edson Silveira Mascarenhas (650,00), Eduardo Alves Fonte (1.788,04), Elisabeth Terezinha Osório (920,00), Elvira Fontes (310,00), Evaristo Manoel Pereira (5.241,56), Fabrício Possebon (111,00), Francisca Martos (810,00), João Batista da Silva (20.000,00), João Faggioni Bellato (3.800,00), João Pessoa Esperanto-Klubo (300,00), Jorge Bastos Furman (964,00), José Cláudio Domingos (1.197,80), José Nogueira Machado (240,00), José Silvestre de Camargo (63,10), Marija Pozder Almada (410,00), Mário João Scaramuzza Neto (200,00), Mozar Alves de Andrade (4.033,00), Néia Lúcia Souza (880,00), Nélio Vicente Costa (920,00), Nelzito Santos (2.400,00), Paulo Amorim Cardoso (4.377,70), Paulo Bello da Costa Lima (1.305,00), Paulo Vicente da Mota (2.000,00), Regina Margarida Marques Lemos (10.247,56), Valmir Alves de Oliveira (831,00), Walkíria Vernacci Lara Rubio (310,00)

# TRA BRAZILO

ANÁPOLIS (GO) - Je la 12-a de februaro enposteniĝis nova estraro de Anápolis Esperanto-Klubo. S-ro Sidney Assis Brasil estas la prezidanto, S-ro Henrique Mendonça la sekretario kaj S-ino Elizene Pires Barbosa la kasisto. Al la tri kaj AEK-anoj ni deziras multe da sukceso.

BAURU (SP) - Je la 6-a de marto okazis la 3-a Nordokcidenta Regiona Renkontiĝo de Ŝtato São Paulo, kiun partoprenis 52 esperantistoj de urboj Bauru, Ribeirão Preto, Sertãozinho kaj Promissão. La celo de la renkontiĝo estis la interŝanĝo de spertoj pri instruado de Esperanto. Prelegetoj, fulmaj E-aj kursoj, komuna tagmanĝo kaj distraj aranĝoj konsistigis la programon.

BOA VISTA (RR) - Projekto pri nomigo de strato en tiu ĉefurbo, prezentita de urba leĝfaranto S-ro Natanael Alves do Nascimento (LIGILO n-ro 18), estis aprobita en la 10-a de novembro 1993. Pere de ĝi, plia strato "Zamenhof" aperas en Brazilo.

BRASILIA (DF) - Taguatinga Esperanto-Klubo (TEK) kunvenigis la esperantistojn por omaĝi Zamenhof, je la 17-a de decembro pasinta. 34 ĉeestantoj kunfratiĝis en ĉina restoracio, kie oni aŭdis kanzonojn en E-o miksitajn kun noticoj pri la internacia lingvo, antaŭe sonbendigitaj. La noticojn oni ĉerpis de loka radielsendo, kiu ĉiusemajne prezentas esperantajn novaĵojn. Ankaŭ partoprenis la eventon eks kaj nuna prezidantoj de BEL, Prof-ino Maria Ester Pinto de Souza, gvidanto de Esperanto-Kurso en Universitato de Brasília, D-ro Roberto Rezende, vicprezidanto de Stomatologia Sekcio de Universala Medicina Esperanto-Asocio, kaj S-ro João Carlos do Nascimento, muzikisto de la rokgrupo "TORINO". Oratoris kaj la prezidanto de BEL kaj la prezidanto de TEK. Pere de poezio, lernantoj de TEK-Esperanta Kurso profitis la okazon por omaĝi ilian instruiston S-ro Carlos Maria, Vicprezidanto de TEK. Gazeto "Correio Brasiliense" noticis la kunvenon same kiel radio "Brasília Super Rádio FM".



CAMPOS (RJ) - Projekto de la tiea leĝfaranto, S-ro Sivaldo Abílio, celanta enkonduko de E-o en la urban lernejan reton (LIGILO n-ro 20) estis aprobita en decembro de la pasinta jaro. Kun granda intereso ni akompanas la sekvontajn paŝojn tiurilatajn. Gratulon, gesamideanoj de Campos!

CURITIBA (PR) - Laŭ programo de Federacia Universitato de Paranao, Prof-ro Geraldo Mattos gvidos superan kurson "Esperanto: Lingvo kaj Historio". Ĝi okazos en la sidejo de Paraná Esperanto-Asocio, la unuan kaj trian sabaton de marto al decembro.

"La Voĉo de Esperanto", organo de Internacia Aŭskultado Klubo Pri Esperanto en Radio, aŭ Distanca Ŝaltilo- DŜ (Ligilo n-ro 20) serĉas aŭtorojn pri la temo rilate al E-o en radio, por disvastigo de la Internacia Lingvo inter esperantistoj kaj ne-esperantistoj kiuj interesiĝas pri esperantaj radiodissendoj. La DŜ-rekta kontato S-ro Marcelo Luiz Brasil Rua Prof. João Doetzer 33, Curitiba (PR) , CEP 81540-190, invitas vin verki tekstojn laŭ jenaj temoj: E-o en radio; teknikaj aferoj (konstruo de anteno ktp) ; teknikaj vortoj (KHz, SW, DX ktp); Historio pri E-o rilate al radio; Raporto (E-a radiodissenda programo); korespondadresoj (radioaŭskultantoj); radioamatorismo (E-aj rondoj, frekvencoj ktp).

DUQUE DE CAXIAS (RJ) - "Saluton! Gesamideanoj!" estas titolo de informa bulteno de Esperanto-Grupo Tiago Apóstolo. Ĝin redaktas S-ro Daniel Pereira Luz. BEL dankas la senditan n-ron 1-an kaj deziras longan vivon al la nova publikajo!

GOIÂNIA (GO) - Kultura Esperanta Centro kaj Arta Muzeo de Goiânia aŭspiciis la I-an Internacian Prezentadon de Artoj kaj Kulturoj. La evento okazis de la 19-a ĝis la 21-a de decembro. La programo konsistis el diversaj eroj: ekspocizioj de tapiŝoj, ŝildoj, fotoj kaj bildkartoj; prezentado de filmoj, korusoj kaj kantistoj. Partoprenis eksterlandanoj enloĝantaj en Goiânia kaj diverslandaj kulturaj centroj de la urbo. Pro tio la artaj eroj estis en angla, germana, hispana kaj itala lingvoj, krom la portugala kompreneble. Eĉ religiaj kantoj en sanskrito aŭdeblis.

ILHÉUS (BA) - Je la 15-a de decembro S-ro Eléus Leonardo de Sá omaĝis Esperanton pere de panelon en agentejo de "Banco do Brasil", kiu vekis intereson ĉe la klientaro de tiu grava financa institucio. Krom tio, S-ro Eléus daŭrigas sian laboron por disvastigi Esperanton pere de artikoloj en pluraj ĵurnaloj. Jen imitinda dediĉo.

LAVRAS (MG) - Post longa periodo sen aktiveco, Lavras Esperanta Klubo reaperas kaj komencas movadi, sub la zorgo de S-ro Aloisio Santos Penoni, al kiu ni deziras plensukceson!

LINS (SP) - Lins Esperanto-Societo sendis estrarraporton rilate la jaron 1993-a: Ĝi informas pri E-disvastigo pere de amas-komunikilo, kurso por infanoj kaj junuloj en lernejo "Escola Fisk" far de profesorino Dulce Maria Sarmento Becari, kaj partopreno en loka libro-foiro. Ni gratulas la prezidanton S-ro Aylton Guido Coimbra Paiva kaj la ceterajn estraranojn de LES.

MACEIÓ (AL) - Tre interesan kompilaĵon ni ricevis de ties aŭtoro, S-ro Aristóphio Andrade Alves Filho, nome: "O ABC da Língua Internacional" (La ABC de la Internacia Lingvo). Ĝi enhavas diversajn informojn pri E-o kaj la movado: gramatikeroj; E-o kaj UNO; lernolibroj; periodaĵoj; Koresponda Servo Mondskala; funkciado de la delegita reto de UEA; Pasporta Servo; E-aj kongresoj; E-o en radio; adresoj de brazilaj asocioj, kie oni instruas E-on; Internaciaj Kulturaj Centroj de E-o ktp. La ĉefa ideo de la aŭtoro estas havigi al ĵus bakitaj gelernantoj ilon por enmeti ilin en la E-an medion, ĉar la verko estas speco de panoramo pri la nuna movado. S-ro Aristóphio intencas eldonigi sian "ABC-on" ĉiujare kaj atendas ĉies opiniojn: kio mankas? kio bonas? kio malbonas? kio ŝanĝeblas? kio plibonigendas? kio forĵetendas? Por pliaj informoj skribu al li, kies adreso estas: Cj. Benedito Bentes 1, rua B-55, n° 85, Q. B-55, Tabuleiro, Maceió (AL), CEP 57084-040.

Laŭ informo de S-ro Aristophio Andrade Alves oni starigis Esperanto-Departementon ĉe Spirita Frateco "Bezerra de Menezes". Gratulon kaj fruktodonan semadon!

NITERÓI (RJ) - Iom post iom Niteroja Bulteno pliboniĝas kaj laŭaspekte kaj laŭenhave. Ĉe ni la numero 76-a, kiun akompanis "Interamike", la monata bulteno de la Junulara sekcio de Niterói Esperanto-Klubo. Krome E-on, Niteroja Bulteno entuziasme pritraktas kooperativismon.

NOVA FRIBURGO (RJ) - En la fama montara urbo okazos la Oka Esperanto-Renkontiĝo de Ŝtato Rio de Janeiro, de la 20-a ĝis la 22-a de majo ĉi-jare.

Aliĝkotizo: 10% de minimuma salajro; por anoj de AERĴ kaj FEG: 7% de minimuma salajro; infanoj ĝis 12-jara, vizitanta eksterlandano kaj handkapulo: senpage. La pagon oni faros perĉeke al S-ro Cezar Augusto Pinto Reimão, Rua Bahia n° 104, Olaria, Nova Friburgo (RJ), CEP 28623-260.

PARAÍBA DO SUL (RJ) - 44-foje aperis E-artikoloj en urbaj gazetoj dum 1993. La respondeculo pri tiu laŭdinda laboro estas S-ro Luiz Alberto de Oliveira Coelho. Represoj de la artikoloj aperis ankaŭ en gazetoj de najbaraj urboj.

PORTO ALEGRE (RS) - Ni ricevis de S-ino Lucila Dávalos Fernandes raporton pri la agado de Departemento de Esperanto de Spirita Centro Allan Kardec (DESEAK) dum la jaro 1993-a. El ĝi ni reliefigas: Esperanto-Kursoj, intervjuo en radistacioj, ekspozicio, disdono de faldfolioj, kunfratiĝaj kunvenoj.

**RIBEIRÃO PRETO (SP) - La II-a Esperanto-Renkontiĝo de la Kultura Esperanto-Centro de Ribeirão Preto okazis en la 29-a de januaro. La programo inkluzivigis prelegojn de UEA-Ĉefdelegito por Brazilo, S-ino Symilde Schenk Ledon, Neusa Priscotin Mendes (Kultura Esperanto-Centro de Ribeirão Preto), Marcos Zlotovitch (EsperantUSP), Cláudio Rodrigues Pistilli (Sorokaba Esperanto-Klubo) kaj James Rezende Piton (Kultura Esperanto-Centro de Campinas).**

RIO BRANCO (AC) - Ĵus bakita bulteno aperas en Brazilo. Temas pri "ESPERANTO EM FOCO", kies redaktoro estas D-ro José Francisco Furtado. La 1-a numero aperis en januaro kaj, tute en portugala lingvo, ĝi prezentas Esperanton kompreneble al ne-esperantistaj medioj. Ni atendas la sekvontajn eldonojn kaj deziras longan vivon al ĝi.

RIO DE JANEIRO (RJ) - Associação Esperantista do Rio de Janeiro (AERJ) kaj Kultura Kooperativo de Esperantistoj (KKE) dum la jaro 1993 trafis la amaskumunikilojn pere de enorma kvanto da E-aj propagandaĵoj. Entute ili sendis 401 informajn materialojn. La rezulto efektivigis pere de 50 artikoloj en gazetoj , 9 prezentadoj en radistacioj (75 minutoj) kaj 4 TV-prezentadoj (37 minutoj). S-ro Jose Rabello de Paula kaj helpantoj zorgas pri tiu grava laboro.

Ĉiumonate BEL ricevas spiritisman bultenon nomita "O Sol Nascente", kiu enhavas kolumnon pri E-o, verkita de S-ro Givanildo Ramos Costa. La lasta bulteno de ni ricevita estas n-ro 300 kaj ĝi festas sian 25-an datrevenon! Estas kvarono da centjaro sen interrompo! BEL gratulas la eldonisto-redaktoron, S-ro Wilson Longobucco, kaj la tutan skipon!

SÃO PAULO (SP) - Ĉe la sidejo de Sindicato de Professores de São Paulo, okazis la 10-a Esperanto-Renkontiĝo de urbo San-Paŭlo kun partopreno de esperantistoj el 7 urboj. La renkontiĝa temo "Estonteco de Esperanto" estis prezentita debatmaniere de veteranoj kaj junuloj geesperantistaj kun diversaj konsideroj pri: nepra perfektiĝo de lingva uzado, graveco de kerno-enhavo de Esperanto laŭ ĝia iniciatoro, atentigo pri disponebleco de skipo por instruado okaze de pli ampleksa akcepto de la lingvo en la eduka medio, konsidero pri amplekseco de atingo al plej diversaj sektoroj de nuntempaj streboj kaj nepraĵoj sociordaj pere de Esperanto, konstato de ia simbologia ekzisto ene de Esperanto, pli vaste signifa kiel tutmonda interfratiĝo ol tio kion ĝi ĝenerale prezentas. La prelegoj estis: "Esperanto kaj Komputiloj" (J.R.Pinto), "Pioniro, Vera Pensulo: Ernest Archdeacon"(G.Ledon), UEA- kaj BEL-Servoj (S.S. Ledon kaj F. M. de Oliveira), "Homaranismo" (W.Francini), Ankaŭ estis rapida kurso de Esperanto kaj arta programo tre varia. Raportis la eventon S-ino Symilde Schenk Ledon, kiun ni tre dankas!

Maria Delza Macabu Jesus, Joel Afonso Francisco kaj Osvaldo Pires de Holanda gvidas e-kursojn ĉe ESPERANTA KLUBO ZAMENHOF (Rua Idioma Esperanto, 363 - Vila Lilia - Sao Paulo -SP ) , kun la partopreno de 40 gelernantoj. La klubo, institucio de publika utileco en la ŝtato Sao Paulo, funkcias en propra sidejo de la jaro 1949.

SOROCABA (SP) - Nova estraro gvidas la tiean grupon, Sorokaba Esperanto-Klubo, sub la prezidenteco de Profesorino Maria Cecília Caramez. La oficperiodo estas 1994/1995. Al la tuta skipo ni deziras riĉan semadon kaj sukcesan rikolton!

TERESINA (PI) - Prof-ro João de Moura Fé estis intervjuita de ĵurnalisto F-ino Ana Kelma Gallas, de "O DIA". Dankeme ni skribis al ŝi kaj kuraĝigis ŝin partopreni de nia perkoresponda kurso, senpage. Samtempe ni petis de Prof-ro Moura Fé kontakti la ĵurnalistinon por scii ĉu ŝi akceptas la proponon. Se ankaŭ vi sukcesos publikigi artikolon pri Esperanto, sendu al ni ekzempleron aŭ eltranĉaĵon kun adreso de la respondeculo pri la kolumno, por ke ni gratulu lin/ŝin kaj donacu la kurson.

TRÊS RIOS (RJ) - La 25-an de novembro, S-ro Luiz Alberto de Oliveira Coelho prelegis pri E-o en Rotary-klubo "Três Rios-Beira Rio". La prelego interesvekis la ĉeestantaron, ĉar oni invitis lin fari la samon por la junularaj tiuurbaj kluboj ligitaj al Rotary, nome "Interact" kaj "Rotaract". S-ro Luiz Alberto estas agema esperantisto de Paraíba do Sul.

VITÓRIA (ES) - Organizita de KEK-Kapiŝaba Esperanto-Klubo kaj KEKI-Kapiŝaba Esperanto-Klubo por Infanoj, okazis je la 12-a de decembro la 2-a Infana Renkontiĝo de Esperanto de Ŝtato Espírito Santo. 50 homoj partoprenis prelegojn, babilis kaj ĝuis naĝadon en Turisma Centro de Guarapari.



VOLTA REDONDA (RJ) - Perletere S-ro Vicente Paulo Werneck informis al BEL, ke la 15-a Esperanto-Renkontiĝo de Paraiba Valo, okazinta je la 5-a de decembro ĉe Metalurgia Inĝenierarta Alt-Lernejo, regule kaj bone marŝis laŭ la programo. Ekzate 42 personoj ĉe-estis kaj eĉ TV teamo raportis la eventon. Oni ankaŭ prezentis sonbendon kun intervjuo pri E-o. La intervjuisto estas la radialisto Dario Azevedo, de "Sul Fluminense Radio", el urbo Barra Mansa, kies demandaron respondis S-ro Alberto Flores. La renkontiĝo jam estas tradicia. La 16-a okazis en la urbo Guaratinguetá - SP, je la 13-a de marto. En ambaŭ S-ino Symilde Shenck Ledon reprezentis estraron de BEL.

# BEL-ANGULO

## 30-a BRAZILA KONGRESO DE ESPERANTO

Survojas la 2-a bulteno pri la 30-a BKE, la 15-a Brazila Esperantista Junulara Kongreso kaj la 4-a Infana Kongreseto, kiu enhavas riĉan informan materialon pri loĝado, kongresurbo, programo (skizforme), restoracioj ktp. Pro tio, ke Natal estas vera paradizo kun allogaj plaĝoj, kadre de la programo okazos tuttagaj kaj duontagaj ekskursoj, aranĝoj

en drinkejoj kaj restoracioj ĉe la plaĝoj, promenoj kaj aliaj distraĵoj. Post la kongreso eblas ekskursi al plaĝo de Pipa (kun promeno al ekologia reservo) aŭ al insulo Fernando de Noronha. Supozeble tiu ekvilibra programo plaĉos al la kongresanoj kaj ili, ni esperas, konscie partoprenos de la "seriozaj" eroj, ĉar estas pluraj aranĝoj por iliaj malstreĉiĝoj.

BRAZILA HEROLDO KAJ LA NOVA BEL-SIDEJO

Kelkaj brazilaj publikaĵoj jam noticis pri la grava novaĵo, tiu temas pri la konstruo de sidejo sur tereno gajnita de BEL. Brazila Heroldo estas bela ekzemplo de apogo tiurilate. Pere de sia n-ro 4, BH reliefigas la aferon en la paĝoj 1-a, 2-a kaj 3-a. Ni ripetas la lastajn liniojn de artikolo verkita de la BH-Ĉefredaktoro, S-ro Josenildo Marques: "Nu, ja estas horo por konstrui. De la brazilaj esperantistoj oni esperas ne nur brikojn, sed ankaŭ ĝisfundan alprenon de niaj movadaj demandoj". Jes, ja! Brikoj kaj ideoj estas bonvenaj!

SIMBOLO KREITA DE HILMAR

Okaze de la jubileo de Esperanto, oni lanĉis internacian konkurson por elekti la simbolon de la evento. La venkinto estis simbolo kreita de nia samlandano Hilmar Ilton S. Ferreira, el Itabuna (BA). Okazas ke, post 10 jaroj, tiuj vidalvidaj rondformaj "E", kiuj stimulas nian menson imagi diversajn figurojn, estas uzataj tra la tuta mondo, spite de kelkaj plendoj de iuj, kiuj ne konas ĝian genezon kaj supozas, ke ĝi estis kreita por anstataŭi aliajn tradiciajn simbolojn. Aplaŭdojn por Hilmar!

PLIA DUMVIVA MEMBRO

Ni jam noticis pri mikrokomputilo, kiun oni donacis al BEL. Moderna kaj perfekte funkcianta, ĝi estas tre utila por niaj administraj taskoj. Iom post iom la kasisto kaj la sekretario regas ĝin. Kvankam la donacinto preferas resti ne konata tiurilate, io devigas nin sciigi lian nomon. Okazis ke, en sia lasta estrarkunveno, BEL atribuis al tiu mistera donacinto la dumvivan membrecon ĝuste pro lia tre valora donaco. Ordinare oni publike sciigas la nomojn de tiuj, kiuj fariĝas dumvivaj membroj. Do ni havas la plezuron informi, ke tiu bonfaranto estas la juna 2-a sekretario de BEl, Wilson Álvares de Oliveira. Dankon, nia kara!

MONDA FORUMO DE LA JUNULARO

D-ro Lício de Almeida Castro, 3-a sekretario de BEL partoprenis 3 kunvenojn okazintajn en Braziljo, kiuj rilatas al la Monda Forumo de la Junularo, okazonta en julio/94. La kunvenoj okazis kaj en Universitato de Braziljo kaj en Ĉambro de Leĝfarantoj. En Ministerio pri Medio, la prezidanto de la Brazila Junularo, Marcelo Senise asertis al D-ro Lício, ke por E-o estos tasko okaze de la Forumo!

ABONSERVO

Iom post iom kreskas la nombro de periodaĵoj perataj de BEL. Malgraŭ tio, ke ankaŭ la taskoj tiurilataj pligrandiĝas, lasttempe BEL sukcesas akurate plenumi ilin. Tamen plendoj pri malfruo aŭ eĉ ne ricevo de gazetoj ankoraŭ aperas, kvankam malofte. Kial?

La motivoj varias, sed preskaŭ ĉiam sendepende de nia volo aŭ ago. Ekzemple, EL POPOLA ĈINIO de januaro alvenis nur je mezo de marto, eble pro ŝanĝoj okazintaj en la administrado de EPĈ; iuj gazetoj venas marpoŝte kaj kompreneble tio kaŭzas malfruon; ordinare en la komenco de ĉiu jaro la nombro de abonpetoj multobliĝas kaj la eldonistoj ne sukcesas akurate pritrakti ĉion; kelkaj poŝtservoj similas al testudoj ktp. Alia problemo estas la neatendita ŝanĝo de abonprezo. En marto ni ricevis fakturon de EVENTOJ kie aperas ŝuldo pro pligrandigo de abonprezo. Laŭ la eldonisto, oni sendis leteron al BEL en oktobro/93 kun informo pri nova prezo. Okazis, ke ni ne ricevis tiun leteron kaj nur post la sendo de 4 abonlistoj (la unua en decembro/93), EVENTOJ atentigas nin pri la diferenco. Kion fari? Ni ne povas postuli de la abonantoj la pagon de la diferenco. BEL ne povas esti taksata kiel nepagema institucio. EVENTOJ asertas, ke la antaŭa abonkotizo preskaŭ sufiĉas nur por la poŝtmarkoj.

## NOVA SIDEJO

Speciala numero de Ligilo (jan/94) diskonigis la plej gravan noticon por la nova jaro. Temas pri la tereno kiun BEL gajnis de la registaro de Braziljo. Kaj nun ni ekpritraktas la reagojn de la esperantistaro. Post la dissendo de 3.000 ekzempleroj de Ligilo, kelkaj homoj telefonis aŭ leteris por prezenti pozitivajn reagojn kaj sugestojn. Ni estas informitaj ke kelkdekoj da dankleteroj atingis Lian Moŝton, S-ro Jorge Cahuy, la deputito kiu decide kaj efike partoprenis la koncernajn demarŝojn. Tamen, ni sincere kalkulis kaj atendis pli da reagoj, kiuj ĝis nun bedaŭrinde estas treege malgrandaj. Se ni ĉiuj fakte volas taŭgan sidejon, kun instalaĵoj por niaj servoj kaj agoj, estas necese pli da engaĝigo. Ju pli da partoprenantoj, des pli malpeza estas la ŝarĝo por ĉiuj. Ni esperas ke ek de nun ni trovos pli da entuziasmo kaj ĉiuspecaj reagoj, ĉar surbaze de la ĝenerala sinteno oni determinos aŭ elektos la vojojn kaj la ritmon de la solvo rilate al la sidejo. Ni memoru ke estas 1080 kvadrataj metroj da tereno! Tie ni rajtas starigi ĝis kvaretaĝan konstruaĵon, kun maksimuma areo konstruita de 3.000 kvadrataj metroj, kie eblas funkcii niaj nunaj kaj estontaj departementoj, krom filioj de internaciaj esperantaj organizoj kaj komercaj entreprenoj kun akciaj aŭ kvotaj partopreno de BEL (ekzemple turisma agentejo, librovendejo, gastejo por esperantistoj kaj ne esperantistoj, ktp). BEL-estraro, siavice, faras la necesajn paŝojn ĉe la registaraj instancoj por akiri la simpation kaj ĉiuspecan apogon cele al la starigo de la sidejo, kiu estas ĉies tasko. Kaj vi, kiu travivas ĉi-tiun decidan momenton de nia movado, certe ne deziros resti marĝene de la historiero. Partoprenu! Sugestu! Engaĝiĝu! Vi povas kaj rajtas, kaj nia movado necesas kaj meritas.

## AGO-TAGO

La 12-an de oktobro 1993 okazis Esperantaj agoj tra la mondo, samkiel en la 10-a de oktobro 1992. Tiaj publikaj agoj estas tre variaj, nome publikaj manifestacioj, disdono de flugfolioj, enketoj, marŝado ktp. Pere de ili oni intencas veki la atenton de ĉiuj ajn homoj al E-o. Ni ne scias ĉu en Brazilo okazis io tiurilate. Tamen ni proponas, ke ĉi-jare ankaŭ nia lando partoprenu tiun eventon. Do pritraktu la aferon kun viaj klubanoj kaj atendu la informon pri la dato de Ago-tago por 1994, ĉar kompreneble ĉiuj agoj devas okazi en la sama tago. Gravas ke ni adekvate elektu kion fari, laŭ la nombro de partoprenantoj. Surstrata marŝado de kvar/kvin homoj estas ridinda, dum eĉ unu nura preleganto en Universitato povas rezulti pozitivan efikon. Sugestoj estas bonvenaj!

# AGENDO

01-08 MAJO 94 Strasburgo (Francio)
TEJO-Seminario en Strasburgo

20-22 MAJO 94 Nova Friburgo (RJ)
8-a Esperanto-Renkontiĝo de Ŝtato Rio-de-Ĵanejro

10-15 JULIO 94 Natal (RN)
30-a Brazila Kongreso de Esperanto
15-a Brazila Esperantista Junulara Kongreso
4-a Infana Kongreseto

23-30 JULIO 94 Seulo (Koreio)
79a Universala Kongreso de Esperanto

## ĈU LA METROO DE LA ESPERANTISTOJ ?

Post 807 tagoj de konstruado, la metroo de Braziljo eniris la provperiodon je la 27-a de marto. La unua funkcianta peco de la metroa reto estas ĝuste tiu, kies unu el ĝiaj stacidomoj situas proksime al nia tereno, en "Samambaia". La loka registaro promesis funkciigi la metroon ĝis la fino de ĉi tiu jaro. Ni intencas baldaŭ komenci la konstruadon de nia sidejo. Do verŝajne en 1995 la uzantoj de brazilja metroo aŭdos ne ordinaran babiladon en la vagonoj, kaŭzita de esperantistoj, kiuj vizitas sian novan domon.



BRAZILA ESPERANTO-LIGO
Cx. Postal 03625 Telef (061) 226-1298
70084-970 BRASÍLIA - DF BRASIL

**IMPRESSO**